

REVUO DE ESPERANTO NEDERLAND

21a jarkolekto n-ro 5 septembro-oktobro 2016

Fenikso

Esperanto Nederland



Fenikso

FORUMO DE ESPERANTO NEDERLAND

www.esperanto-nederland.nl

Dumonata membrogazeto de Esperanto-Nederland
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton; la jara kotizo estas € 30,- (por samdomanoj € 10,-); membroj de NEJ pagas € 15,- (ties samdomanoj € 5,-); *Fenikso* estas aparte abonebla nur por ne-membroj en eksterlando. Tarifo EUR 17,50.

Por tiuj, kiuj tion bezonas, son-kasedoj kun la enhavo estas haveblaj. Informojn donas la sekretario.

Redakcio: <redakcio@esperanto-nederland.nl>
Gerrit Berveling
Van Vredenburgweg 435 - 2284 TA Rijswijk, Nederlando
+31 (0)70-2134914 - <gerritberveling@ziggo.nl>

Esperanto Publike: Gazetartikoloj ktp estas bonvenaj ĉe la redaktoro Gerrit Berveling, same kiel informoj pri mencioj de Esperanto en radio kaj televido. Bonv. indiki detalojn.

Lingva rubriko:
Emiel Van Damme
Albert-I-straat 44 - BE 1703 Schepdaal, Belgio.

Teknika redaktoro: Eriko, Esperanto-Centro Antverpeno.

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.

ESPERANTO NEDERLAND

Prezidanto: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverwijk; tel. 0251-23 10 79 <moerbeekr@gmail.com>

Sekretario: PROVIZORE Pieter Engwirda, Wighenerhorst 49, 6603 KH Wijchen. <info@esperanto-info.nl>

Membro-Administranto: Remment Balk, Egeïsche-straat 42, 8303 EN Emmeloord. tel.: 0527-23 93 78; <membroj@esperanto-nederland.nl>

Kasisto: s-ino Loes Demmendaal, Duikerlaan 160, 2903 AC Capelle aan den IJssel. l.a.demmendaal@planet.nl <kasisto@esperanto-nederland.nl>

Bankkonto: IBAN : NL10 TRIO 0786 8441 67 nome de ESPERANTO NEDERLAND, Capelle aan den IJssel; UEA-konto: esne-h.

Instruado: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverwijk; tel. 0251-23 10 79 <moerbeekr@gmail.com>

Ĝemelaj Urboj: Pieter Engwirda, Wighenerhorst 49, 6603 KH Wijchen; tel. 024-645 51 33 / 0622-60 33 79 <pieter.engwirda@gmail.com>

Informado/informmaterialo: Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 EW Groningen; tel.: 050-57 18 842. <info@esperanto-info.nl>

Studie-veekeinde:
<studosemajfino@esperanto-nederland.nl> aŭ Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen

ENHAVO

De via redaktoro	2
De la estraro	3
El mia leterkesto	3
Esperanto publike	4
Filmoj rete	5
Recenzoj	5
Invitoj	6
Quo vadis? Oude koeien uit de gracht	6
Raportajoj	7
Someraj 2016 en Greziljono	9
Kiel plej eŝeike lerni lingvojn?	12

ALVOKO

Bv sendi estonte viajn bildojn, fotojn k.s. al la redaktoro! Via revuo bezonas vian subtenon!

GB

DATOLIMO

Materialo por la venonta numero estas bonvena ĝis la komenco de oktobro 2016. Sendu ĝin kiel eble plej frue, tiam vi ege helpas nin.

ĈE LA FRONTPAĜO

Tie ĉi estas du bildoj el la UK en Nitro; la fotojn sendis Mareje van Erp. Ankaŭ aliloke ĉi-numere vi renkontos raportajojn aŭ impresojn pri tiu UK.

gb

DE VIA REDAKTORO

En la nuna numero superregas la impresoj el la UK. i.a. vi trovas impreson pri prelegi pri Kiel lerni lingvojn? Laŭ mi sufiĉe saĝajn ideojn tie vi trovas. Ineke Emmelkamp zorgis pri pluraj fotoj el Nitro, sed ankaŭ verkade regalis nin. *Ĉe Esperanto publike* ĉi-foje pleje gravas Loesje – kaj kiu enigmuldo kaŝiĝas tie? La rubrikon *Filmetoj rete* ĉi-foje vi varmigu per arda intereso: ja valoras, kion niaj gemikoj plurlande metas sur la reton. Prenu la komputilon, iom tajpu la foje enuige longajn nomojn – kaj ĜUU PLENE! Ne nur pri la UK temas nun sed ankaŭ pli pluraj alilokaj Esperantokunvenoj.

Ni provis kunmeti por vi legindan numeron.

gb

DE LA ESTRARO

De la Estraro ĉi-foje ne venis specialaj tekstoj por informi vin. Sed mi eksciis, ke estos diskutate, kiel en la estonto oni traktos pri la revuo, kiel aranĝi sekvasezone novan duoblan numeron kune kun



FEL, k.s. pri parencaj temoj. Sci-vola mi estas, kiel unue solviĝos la redaktoreco pri *Horizon-taal*, ĉar la antaŭa redaktoro, kies laboron mi tre aprezis kaj dankas, sen plezuro sin sentis devigita, demisii.

gb

EL MIA LETERKESTO

1] Novaĵoj en la kanalo de UEA.

Aleks Andre, somera UEA-volontulo en la CO, rearanĝis la kanalon laŭ pluraj spektindaj listoj, kaj komencis novan serion da filmetoj pri Esperanto-gazetoj tra la tuta mondo. Revizitu la kanalon, ĉar novaj filmetoj alvenos.

<https://www.youtube.com/user/UEAviva>

Emilio Cid, Estrarano de UEA pri informado

2] **Kial poemo de Ezra Clark Stillman estas en paĝo 7** de *Fenikso* de julio-aŭgusto 2016? Interlingua estas aberacio kaj Ezra Clark Stillman estas perfidulo de nia sankta afero. Interlingua estas jam en agonio, sed nia kara Esperanto vivos ĉiam. Varmajn salutojn al vi ĉiuj de **Frans Cobben**

Reago de la REDAKTORO: Kun plezuro mi konstatis ĉi reagon al detaleta en nia lingvo-instrua rubriko, kiun redaktas Emiel Van Damme. Nur malofte mi rimarkas, ke iu efektive ĝin legis – do koran dankon! Enhave tamen mi bedaŭras la tonon de la letereto de Frans Cobben: Ezra Clark STILLMAN (1907-95) ja sen ajna dubo estas fama inter niaj Esperanto-poetoj, kvankam nur kiel minora: oni prave retrovas lin en ambaŭ eldonoj de la *Esperanta*

Antologio de William Auld, en la monumenta verko *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto* de G. Sutton kaj ankaŭ en la *Historio* de Minnaja-Silfer. Ke poste li forlasis Esperanton, ne faras lin perfidulo – post Interlingua ankaŭ tion li forlasis; bedaŭrinde ofte la vivo iras simple aliajn vojojn. Plej famas tiurilate Kabe (1872-1959).

3] **Mi ŝatas la akran tekston de Kees Ruig** (Malden) en paĝo 12 pri la ve-krio kaj la kverelo en la estraro de LEEN. “Merkatumado ankoraŭ nun estas blasfemo en Esperantujo”, Kees Ruig prave verkis. Varmajn salutojn al vi de **Frans Cobben**

Ndlr: **Vidu la reagon ĉi-numere de Ineke Emmelkamp sub titolo: Quo vadis?**

4] Ĵus ankaŭ **volumo 2** (lecioj 12-22) de *Esperanto per rekta metodo de Stano Marček*. Ĝi publikiĝis kiel apo por Android poŝtelefonoj. La kurso do nun estas kompleta. Oni povas elŝuti kaj instali la apon el la Google Play butiko (serĉvorto: Esperantoplus). Informoj pri ĝi ankaŭ per www.iei.nl/apoplus.htm La unua apo, **volumo 1**, kun lecionoj 1-11, jam elŝutiĝis pli ol 1500 fojojn, plej multe en Brazilo, Usono kaj Hungario, sed ankaŭ multaj en i.a. Germanio, Rusio, Meksiko kaj

Sudkoreio.

La aprezocifero estas 4,4 (el maksimume 5 poentoj).

Oni povas elŝuti kaj instali tiun apon el la Google Play butiko (serĉvorto: *Esperanto* aŭ *Esperantokurso*). Informoj pri ĝi ankaŭ per www.iei.nl/apo.htm

Kompreneble reagoj estas tre bonvenaj. Mi esperas, ke oni ankaŭ jam pririgardos ĝin en Nitra, Slovakio, kie okazas nun la UK. [Ndlr : tiu UK intertempe okazis]

Piet Buijnsters, programisto, Estrarano de Internacia Esperanto-Instituto, Hago, Nederlando www.iei.nl

5] Estimata kaj kara estraro!

Hodiaŭ okazis la lasta kunveno de La Amsterdama Rondo en la agadperiode 2015/2016.

Tiu kunveno samtempe estas la lasta, kiun mi organizis. Post x-oj da jaroj mi ĉesas tiun laboron. Tre feliĉa mi estas pro la preteco de kvaropo, kiu transprenos miajn taskojn. Temas pri Leston Buell, Peter Ebenau, Miko Kuijn kaj Bert de Wit. Krom ili Federico Gobbo estas konstanta kunlaboranto dum la periodoj, kiam li estas en la lando. Kaj krom-krome pluraj regulaj ĉeestantoj en LAR-kunvenoj promesis sian kunlaboron, se necese.

Sciante ĉion ĉi mi plenfide transdo-

nis/os miajn taskojn.

Je la fino de la kunveno surprize alparolis min Rob Moerbeek, prezidanto de Esperanto Nederland. Li esprimis dankvortojn al mi nome de la Asocio. Li transdonis belan ciklamenon kaj - certe bongustan - ĉokoladon.

Kortuŝita mi estis pro tiu atento ne atendita. Mi aprezas ĉion, flegos la planton, gustumos kun aliaj personoj la frandaĵon, SED la vortoj estas grifitaj en mia memoro.

Mi dankas al la estraro. Kvankam mi iom demisias el diversaj funkcioj/taskoj, mi restas JE VIA SERVO!

Ans

A.J. Bakker-ten Hagen
<jeannette020@gmail.com>

6] MIRI KAJ ADMIRI

Legante la 3-an numeron 2016 de *FENIKS**, tutkore mi gratulas al vi. Mi legas de la unua vorto ĝis la lasta, krom la nederlandaj tekstoj.

En ĉi tiu numero, kiam mi legis: kiom multege laboras ROB MOER-



BEEK, mi sentis, ke mi nepre deziras esprimi mian miron kaj admiron.

Trege mi dezirus, ke inter junaj esperantistoj troviĝu du-tri helpemaj entuziasmaj personoj, kiuj povus transpreni parton de lia enorma kaj valorega laboro!

Laŭ hungara proverbo:

“TIUN ĈEVALON ONI BATAS, KIU TIRAS!”

Komprenu bone! Ĉar Rob trege bone laboras, ĉiuj dezirus lian kontribuon!

Mi deziras al Rob Moerbeek bonan sanon, ke li ankoraŭ longe laboru, sed samtempe, li havu ankaŭ helpantojn!

Sigmond Julia
2016.06.28.

QUO VADIS? OUDE KOEIEEN UIT DE GRACHT

En la *Fenikso* nr. 2016/4 aperis artikolo, verkita de Kees Ruig kun la titolo 'Quo Vadis'.

Mi povus konsenti kun kelkaj frazoj. Sed aliaj iritas min. Tial mi nun reagis. Kees prelegis iam en la sesdekaj jaroj en kunlaboro de alia organizo. Poste Kees mencias la kverelojn en la estraro de LEEN kaj la vekriojn en la kelkaj kluboj kiuj okazis tiam.

Kiel valoras mencii tiujn malnovajn aferojn? Tio ne estas 'quo vadis?', sed resonigi kantaĉon jam forgesitan!

Estas pli bone skribi pri la nuna situacio, la hodiaŭa socio.

Pri Esperanto aperis multaj artikoloj, filmoj kaj kursoj en retejoj, jutubo kaj fejsbuko. Ankaŭ *Esperanto Nederland*, aliaj asocioj kaj personoj estas aktivaj en tiuj kampoj. La Esperanto-kurso *Duolingo* furoras en la tuta mondo. Miloj da junaj homoj tiamaniere lernas Esperanton. Pli kaj pli estas specialaj programoj en tiu nova medio.

En la studsemajnfino en Buurse (marto 2016) estis pluraj junaj partoprenantoj, kiuj tralaboris la Esperanto-kurson en *Duolingo*.

Por la venonta studsemajno en Schoonloo (sept.2016) 7 novaj homoj partoprenos al la kurso de nivelo 1, gvidota de Katalin Kováts.

Esperanto Nederland aktive partoprenos en la granda lingva festivalo Drongo (sept.2016). Jam dum pluraj jaroj. Unue kun simpla budo, sed nun ankaŭ prizorgis prelegojn kaj kursojn. Temas pri tutlanda festivalo pri diversaj lingvoj, inkluzive Esperanton! Mi prizorgis prelegon en festivalo, organizita de la sinagogo en Groningen. Mi prelegis pri la vivo de Zamenhof kaj Esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj mi faris prezenton dum semajnfino de *Mensa*, asocio de tre kleraj homoj. Ili invitis min! Alia Groningena prizorgis prelegon dum festivalo de la Groningena Historia Asocio. La temo es-

tis PACO. Ili invitis lin! Li faris prelegon pri Esperanto kaj rapidkurson. Kaj mi estas certa, ke pluraj aktivaj Esperantistoj faras same. Daŭre *Esperanto Nederland* eldonas novajn informilojn pri Esperanto: Sleutelĵe, Esperanto - zó op zak, librotentilo kaj 'Ontdek het Esperanto'.

Esperanto Nederland pretas subvencii la lingvan katedron 'Interlingvisto kaj Esperanto' kaj havas bonajn kontaktojn kun la profesoro Federico Gobbo. Kelkaj membroj havas kontaktojn kun internaciaj kluboj (kiel Wereldfederalisten).

La nunan socion oni ne povas kompari kun tiu de la tridekaj aŭ la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento. Estas tro facile por diri ke la nuntempaj Esperantistoj restas nur en siaj rondetoj. Ĉu vere mankas praktika agado? Laŭ mi ne. Lasu la maljunajn bovinojn en la fosajo!

Ineke Emmelkamp

FILMOJ RETE

1] Prezento de la bita eldono de Donkiĥoto (kun etaj partoj en la hispana)

<https://youtu.be/Vmb-quPgYa0>

2] Asorti kantas «En restoracio», en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto

<https://youtu.be/vxaWI2Dp278>

3] Jen 5-minuta filmo pri la 75a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 26a Seminario por Aktivula Maturigo

<https://youtu.be/c1AZrHYhfho>

4] filmetoj el diversaj lokoj :

<https://www.youtube.com/watch?v=6UP9xNdkDsE&feature=youtu.be>

5] Miguel Fernández prezentas sian laste aperintajn librojn, en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, 2016.

<https://youtu.be/dtXA6k7nghs>

6] José María Salguero faras enkondukan prezenton pri Ekstremaĉuro (Extremadura) en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto:

<https://youtu.be/ypRYexE3WeQ>

7] Miguel Fernández kantas «En vesper' aperis pluv'» (Esta tarde vi llover) en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, 2016.

<https://youtu.be/XAqfXhy107c>

8] Mikaelo Bronŝtejn deklamas sian poemon «Vivresumo» (kun subteksto), en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, 2016.

<https://youtu.be/bkERt200BHE>

9] István Ertl parolas pri «Kiaj ni estas kaj kiaj ni estu» en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Herrera del Duque de la 30a de junio ĝis la 4a de julio 2016.

https://youtu.be/Q37hNr_CcI

10] Liven Dek parolas pri ankoraŭ nesufiĉe prilaborita kampo de agado por la esperanta kulturo, en la 26a Seminario por Aktivula Maturigo, organizita de UEA kaj Hispana Esperanto-Federacio:

<https://youtu.be/qrLa2oYNzw8>

11] La «Coral municipal de Herrera del Duque» kantas la himnon de Esperanto «La espero», en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Herrera del Duque de la 30a de junio ĝis la 4a de julio de 2016.

<https://youtu.be/yLaz5eMrCDc>

12] Irek Bobrzak parolas pri podkasto, kaj pli precize pri la agado de «Varsovia Vento» tiukampe, en la 26a Seminario por Aktivula Maturigo, organizita de UEA kaj Hispana Esperanto-Federacio.

https://youtu.be/pQoV_w4PE4E

13] La «Municipa orkestro de Herrera del Duque» regalis la partoprenantojn de la 75a Hispana Kongreso de Esperanto per kvin muzikpecoj, jen unu el ili; «En la mondo» (En er mundo).

<https://youtu.be/6dXavDqb8Mg>

14] **jen bona afero:** <https://www.youtube.com/watch?v=URUFYXJknEI> salutas Gersi Bays

15] Miguel Fernández parolas pri sia **propra sperto pri la nereakta prezento de Esperanto al ekstera publiko, pere de literaturo**

https://youtu.be/bY893Nm_qaQ

16] **Jorge Camacho prezentas la poeton Baldur Ragnarsson**, kaj, kune kun la ĉeestanta publiko provas interpreti unu el ties lastaj poemoj, en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Herrera del Duque:

<https://youtu.be/bEeXU3P7C4M>


ESPERANTO PUBLIKE

Tutmonda Lundo

Por Loesje en ŝia ŝirkalendaro 'Tutmonda Lundo' regule signifas 'Esperanto'. Kelkfoje ŝi uzas la saman tekston, sed kun iom diferenca traduko, kiu tamen estas ĝusta kaj senchava.

Lundon, la 1-a de aŭgusto, la teksto (vidu aldonon) legiĝas "Lingva plezuro: la vortoj ridas el la buŝo", kion ŝi tradukis "Echte taalvrijheid heb je als iedereen je begrijpt". Jen bona slogano por la Esperanto-movado.

Ĉu Loesje estas Esperantistino?



Kees Ruig, Malden.

INVITOJ



1] DRONGO-TALENFESTIVAL: Jaarbeurs Utrecht 30 sept - 1 okt.

Prezentado *ESPERANTO: LEVEN-DE TAAL EN CULTUUR* - Prof. dr. Federico Gobbo, bijzonder hoogleraar Interlinguïstiek en Esperanto.

(<https://www.facebook.com/esperanto.nederland/posts/1104850889592724>)

Prof. Gobbo faros sian prezentadon **sabate 1 okt 12.00-13.00.**

Ambaŭ tagojn de la Festivalo ĉeestos Esperanto Nederland kun propra stando. Pli da informoj ĉe Website Drongofestival:

<http://www.drongofestival.nl>

<http://www.drongofestival.nl/events/esperanto-levende-taal-en-cultuur/>

2] La 15-a NR ĉi-jarfine okazos de la 27-a de decembro 2016 ĝis 3-a de januaro 2017, mardo ĝis mardo en Saarbrücken, samtempe kaj samloke kun la 8-a NIS, la programo por junuloj.

NR do denove estos **tuj apud Francio**, kion certe bonvenigos aparte la francoj :) Ja fakte Saarbrücken estas landlima urbo... Ankaŭ suda Germanio kaj Svislando denove pli proksimas. Ni do esperas, ke multaj el vi eluzos la fakton, ke ekzemple la trajna distanco inter Parizo kaj Saarbrücken estas malpli ol du horoj...

Jen la **informa paĝo** kun aliĝilo <http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>.

Internacia etoso, prelegoj, kursoj, koncertoj, ekskursoj ...

Do, multaj kaŭzoj por veni kaj reveni al NR/NIS... :-). Ĉu vi ŝatos festi kun ni novjare en internacia rondo? Do venu al la 15-a NR! Ĉion bonan al vi, belan someron kaj esperinde ĝis revido dum NR/NIS, por la organiza teamo de NR/NIS

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

<http://www.esperanto.land>

3] *Kom naar ons BeNeLux-Congres in Lier van vrijdag 16 tot maandag 19 september 2016!*

<http://bnk2016.weebly.com/nederlands.html>

Groeten, Ineke

RECENZOJ

En 2016 aperis ĉe Exit **Kvin geamiko**, de Julia Sigmond, 480 paĝoj da leteroj kiujn ŝi ricevis de Ada Fighiera-Sikorska, Johannes Paulu, Nikolao Danovskij, Stanislav Janusiewicz kaj Tibor Sekelĵ. (ASBN 978-973-7803-31-3)

La korespondado kun kvar el ili komencis en la fruaj sesdekaj jaroj, tiu kun Tibor Sekelĵ en 1965 post lia alvoko al multaj esperantistoj, fondi la Internacian Instituton por Oficialigo de Esperanto, IOE.

La leteroj spiras etoson de varma

amikeco, sopiro pri renkontoj, bedaŭroj pri malebleco libere vojaĝi: nur Ada Sikorska post sia edziniĝo vivis en okcidenta Eŭropo, ne bezonis peti pasporton por ĉiu nova vojaĝo.

Ĉiuj skribas pri manko de tempo pro agado pri Esperanto, foje pro sanstato. Ĉiuj regule mencias la reŭmatismen, pri kiu Julia Sigmond suferis tiutempe.

Inter la leteroj de Tibor Sekelĵ estas kelkaj pri IOE, kiun li post multaj klopodoj malfondis en 1972.

Iu klariga enkonduko bonvenus; la leganto nun ne scias, kial ekestis longaj periodoj de silento en la korespondado kun ĉiuj geamiko, kaj finiĝis la kontakto kun unu el ili (pri la aliaj estas klare, ke la morto finis la kontakton.)

Ne estas klare, ĉu la leteroj kaj mesaĝoj estas laŭlitere kopiitaj: abundas eraroj pri kiuj mi ne scias, ĉu ili enestis en la originalaj leteroj aŭ ĉu temas pri nekontrolitaj tajperaroj en la manuskripto.

Anneke Schouten-Buijs

Jen ĉarma poemeto de la ĉina poeto **ZEE Saint Jules** (1902-1986). Kunlaborinto de 'Literatura mondo' kaj de diversaj ĉinaj gazetoj. Poemoj en '**Naŭ poetoj**' (1938). Eldonis multe da tradukitaj poemoj ĝis 1980.

ONDOJ

- 1 Nuberoj velas, kaj marfluo ŝvelas.
Ĉio jubilas sub ĉiel' senbride.
Ondoj petolas kiel junaj fokoj.
Jen, ili dispeciĝas elĉerpate
5 Sur embuskantaj nigraj rokoj.

Sed facilmove levas sin denove
Kun ŝaŭma vest', el ĉielblu'.
(Ho, ravas la sovaĝa kant' de l' mevoj!
Ili ĝojkrie vagas ĉiam plu
10 Samkiel miaj etaj revoj).

Golven

Wolkbrokjes zeilen, en zeevloed zwelt aan.
Alles jubelt onder de hemel, ongebreideld.
Golven dartelen als jonge zeehonden.
Kijk, ze vallen uiteen, uitgeput,
Op belagende zwarte rotsen.

Doch lenig verheffen ze zich opnieuw
Met schuimend vest, uit 't hemelsblauw.
(Ho, verrukkelijk is de meeuwenzang!
Zij, met vreugdekreten, zwerven steeds voort
Evenals mijn kleine droompjes).

PRI LA POEMO

La titolo: Ondoj

Jen certe ege sugesta° vorto ! Kial? *suggererend*
La vorto 'ondo' povas efektive° *inderdaad*
rilati° al multaj aferoj, *betrekking hebben op*
i.a. al ...akvo moviĝanta aŭ al... *interalie (ndl. o.a.)*
dunoj aŭ tritikaj kulmoj° *duinen, tarwehalmen*
aŭ al elektraj aparatoj aŭ eĉ hararo.

Verso 1. Nuberoj velas, kaj marfluo ŝvelas.

Nuberoj estas eroj de nuboj
(ero = plej malgranda parto de tuto)
alivorte ?

pecetoj° de nuboj. *stukjes*
La radiko **nu-** troviĝas en la franca...
nuage, nuée.

Kiel estiĝas° nuberoj? *ontstaan*
Pro la influo de ventoj kaj de la temperaturo
de la aero kaj de la akvo.
Tiu nuboj **diseriĝas**° = ? *uiteenvallen*
Ili iĝas **dividitaj** en **erojn** (partetojn)

Tiuj nuberoj **velas**.

Kp. france: *la voile*

Ili impresas kiel veloj. Ili estas ĉi tie komparataj kun kiaj ŝipoj?

...kun **velŝipoj**°. *zeilschepen*

Kial tiu komparo en la poemo?

Ambaŭ moviĝas pro aŭ danke al la vento.

Kiuj ŝipoj uzas **nun** velojn?

ŝipoj por sporto.

Kiam oni **hisas**° (etendas°) la velojn? *hijzen; strekken*

Kiam la vento estas favora°. *gunstig*

Jen bela priskribo de la maro. Kvankam temas pri tute normalaj aferoj. Tamen, kiucele° *met welk doel* ili estas menciitaj?

Por bone prezenti la kadron de la okazontaĵoj°. *komende gebeurtenissen*

Notindas en la verso tamen io speciala koncerne rimojn:

la du duonoj° rimiĝas inter si ! *helften*
Jen 'interna' rimo° *binnenrijm*

Verso 2. Ĉio jubilas sub ĉiel' senbride.

La vorto '**jubili**' estas ege esprimiva. Oni kvazaŭ aŭdas la ĝojkriadon.

Kaj ĉiu konas ĉe ni la anglan krimon 'youpee' !

Senbride

Notindas la simileco de la vortradiko:
nederlande: **ongebreideld** (teugelloos)
france: **débridé**

Kia ni imagu tian ĉielon?

Verŝajne sunplena?

Nuboj ĝenerale ne stimulas al jubilo, sed nuberoj velas for kaj lasas la sunon brili.

Jen denove verso interesa pro sia **muzika impreso**.

La akcentitaj° silaboj ĉi kaj *beklemtoend*
bri/bi bele **skandas**° la verson. *scanderen*

Kion oni povas/devas **bridi**? *beteugelen*
koleron, ambicion, fantazion, havemon° *hebzucht*
Meti bridon al kriado, optimismo, deziroj...

Verso 3. Ondoj petolas kiel junaj fokoj.

kp. france **pétillant** (bruisend)

Ondoj **petolas**° uzante sian troon...*dartelen, stoeien*

da energio, da vivĝojo.

Z: Petolado sen mezuro ne ...

kondukas al plezuro.

Mateloos spelen geeft geen vreugde.

Verso 4. Jen, ili dispeciĝas elĉerpite

Analizo de la vorto **dispeciĝas**:

=laŭlitere°: en disajn pecojn iĝi

letterlijk: in verspreide stukken komen

Kian mov(iĝ)on sugestas tiu verbo?

movon el iu centro kaj en

ĉiujn direktojn.

Pro kio, kial la ondoj dispeciĝas?

Ĉar ili falas sur la rokojn el la sekva verso.

Kial la ondoj estus **elĉerpitaj**?

Eble ĉar ili jam falis de tre fore, kvazaŭ ili

faris longegan vojaĝon?

Kial '**elĉerpite**' en la adverba formo ?

eble 'estante post elĉerpiĝo' ?

Kio fakte estas **ĉerpi**? ĝ

putten, scheppen

kp. iu kun **neelĉerpebla**° pacienco

onuitputtelijk

Kiam via/ies (poŝ)mono plej rapide **elĉerpiĝas**?

Kio alia povas ekzemple elĉerpiĝi?

Ies espero, ies pacienco, ies amo, ies

entuziasmo...

Kio povas esti neelĉerpebla fonto° de

bron

kono° (vortaro)

kennis

de ĝojo (iu kanto),

de zorgo (monujo)...

Verso 5. Sur embuskantaj nigraj rokoj,

Kiel rokoj povus **embuski**° iun?

belagen

Ne rekte° sed, pro la fakto, ke ili

rechtstreeks

povas kaŝi iun aŭ ian danĝeran, ili kvazaŭ

embuskas.

Embusko°

hinderlaag

kp. franclingve: une embûche; angle: ambush

Embusko estas manovro, per kiu atakonto

kaŝas sin, por ...

surprizi kaj facile **kapti** ĉasaĝon°

buit

aŭ **venki**° ...

malamikon.

overwinnen

nigraj rokoj

El kia ŝtono tiaj eble estus konsistas?

El ia ajn, sed ĉiakaze malseka°, sombra.

nat

Verso 6. Sed facilmove levas sin denove

facilmove = kun aŭ per facila movo (adverbo).

facilmove/denove: notindas

jen alia interna rimo.

Kio **levas** sin?

La ondoj el verso 3.

Denove notindas la akcentado de la verso, kiu

respegulas°...

weerspiegelen

la movon de la preparolata ...

ondo.

Por bone sugesti la movon de ondoj oni nepre

legu la verson laŭte kaj flue°.

vlot

Verso 7. Kun ŝaŭma vest', el ĉielblu'.

Kiu surhavas tiun **ŝaŭman** veston?

La ondoj el verso

3.

Kion sugestas la notinda uzo de la vorto **vesto**?

Ke la ondoj portas nun veston, ili ne plu

aspektas kiel antaŭ la okazintaĵo.

Kiam la ondoj estas kovritaj de blanka ŝaŭmo?

Kiam la vento iĝas pli forta.

Verso 8. (Ho, ravas la sovaĝa kant'

de l' mevoj!

Kial tiuj krampoj?

La leganto komprenu, ke finiĝis la

okulfrapa° sceno, en kiu la aŭtoro

opvallend

kvazaŭ flugis for kun la mevoj, kaj ke la atento

nun ne plu koncentriĝas sur la ondojn.

La rakonto nun temas pri la mevoj. Ĉu la kanto de

mevoj estas sovaĝa?

Eble anstataŭ 'kanto' oni pli ĝuste diru ...

'krio' aŭ 'kriado'?

Tamen ĉi lasta ravas° la poeton tiom,

bekoort

ke li ne hezitas paroli pri kanto. La klarigo aperas

en la sekvanta verso.

Verso 9. Ili ĝojkrie vagas ĉiam plu

Do temas ĉi tie pri kiaj krioj?

pri ĝojkrioj.

La plonĝado al la golfoj kaj la vagado

ekscitis° ilian ĝojon.

opwekken

Kiel la poeto distingas ĝojkriojn de aliaj?

Eble li estas tiurilate spertulo° aŭ

een ervaren

lia imago° atribuas°

verbeelding; toeschrijven

kriadon al ĝojo?

Kion sugestas la vorto **vagi**?

Iri de unua loko al alia sen difinita celo°.

doel

iri sen celo, sencele.

Verso 10. Samkiel miaj etaj revoj).

Kial la vorto **samkiel** anstataŭ la simpla **kial**?

Por pli klare substreki° la ...

onderstrepen

similecon°.

gelijkenis

Kial **etaj** anstataŭ 'malgrandaj'?

La vorto sonas pli ĝentile, pli

dorlote°. Ĝi havas grandan

vertroetelend

psikologian sugestopovon°.

suggestieve kracht

Krome, la vorto 'malgrandaj' estus preskaŭ

g) ĉe ventblovado°

het blazen van de wind

terure° materialista por io tiom

verschrikkelijk

intima kiom ...

etaj revoj.

La vorto 'etaj' povas krome°

bovendien

esprimi ĉi tie kiun alian senton?

modestecon (veran aŭ ŝajnan !).

Konkludo

Jen unuavide ĉarma poemo pri marbordaj okaza-

ĵoj. Relegante ĝin pli atente oni povas malkovri

multajn ege interesajn trajtojn°.

kenmerken

Unue **la regula ritmo** de la rimiĝantaj versoj,

kiu tre subtile kreas ĉe atenta legado la bone

konatan maran atmosferon. Ankaŭ la **akcentado**

de la versoj eĥas° regule

weergalmt

la **ondadon**° de la mar-akvo.

deining

Ĉu la **rimoj**, en teksto pri la mar-ondoj, ludas ian

rolon?

Ili siavice° bone sugestas la

op hun beurt

similecon de ĉiuj tiuj senfine revenantaj ondoj.

PLIE PRI IUJ UZITAJ VORTOJ

Ondoj (titolo)

Kio i.a. translokiĝas° per ondoj?

zich verplaatsen

la sono, la lumo.

ond(ad)i

Sub la blovo de la vento la akvo ondas.

ondumi° la tolon°: prilabori la tolon

onduleren; linnen

por ke ĝi prezentu regulan aron° da ondoj.

groep

Kiel obteni° belan **ondumadon** de la

verkrijgen

haroj?

Klarigenda: **disondo**° = ?

kielzog

Sulko°, kiun ŝipo lasas malantaŭ si.

rimpel

'dis': la ondoj disiĝas.

Nuberoj (verso 1)

Ero = elementa peceto° de io.

stukje

Kie /kiam oni riskas ricevi en la okulon

jenajn°: (Sugestaj sekvas sube)

de volgende

1) **sableron** (zandkorrel) 2) **fajreron** (vonk)

3) **moneron** (geldstuk) 4) **neĝeron** (sneeuwvlok)

5) **polveron** (stofje) 6) **pluveron** (regendruppel)

Jen iuj sugestoj:

a) en neĝoŝtormo (4)

b) senpolvigante° meblojn (5)

afstoffen

c) sur la plaĝo° (1), en dezerto (1)

strand

ĉ) ekstere dum pluvo (6)

d) forviŝante polvon (5)

e) apud fajro (2)

f) dum ŝtormo

Velas (verso 1)

Esprimo: **Veladi kontraŭ la vento**. = ?

agi en/sub malbonaj kondiĉoj.

Proprasence aŭ figurasence?

Kial 'veladi' anstataŭ 'veli'?

La sufikso -ad substrekas° la

onderstreept

longecon, do eble ankaŭ la malfacilecon de la

ago°.

handeling (cf. actie)

Kp. senfina telefonado, kantado, babilado...

Malfluo (verso 1)

La **fluo** de la tempo, de la memoroj, de la sango

en niaj vejnoj, angioj...

Kiaj regionoj ĝenerale altiras plej grandajn

fluojn da turistoj?

Kiel parolas iu, kiu parolas **flue**?

facile, senhezite.

druppelsgewijs

Kio estas la malo de 'paroli flue' ?

balbuti°,

hakkelen, stotteren

paroli heziteme°.

aarzelend

Laodoro de violoj **fluas** en la aero.

Kia akvo estas pli pura: **fluanta** akvo aŭ ...

stagnanta?

Kio preferindas: naĝi **laŭflue** aŭ **kontraŭflue**?

Ĉio dependas de la celo!

doel

Ĉiu fluo restu en sia **fluejo**° = ?

bedding

Ĉiu restu ĉe siaj propraj aferoj.

Ĉion **superfluan** formetu!

overbodig

Jen lernindaĵoj de Z. pri 'fluo':

Feliĉo venas gute°.

druppelsgewijs

malfeliĉo venas flue.

Het geluk komt druppelsgewijs, het ongeluk

komt als een vloed.

(gute = per gutoj)

Mono fluas al riĉulo, batoj al malriĉulo.

Ĉu esprimiĝas per tiu opinio pesimismo aŭ

realismo?

Espereble fariĝos iam kunfluigo de la homoj

en unu ĉiuhoman popolon.

Het is te hopen dat ooit het samenvloeien van de mensen zal

groeien tot één volk van alle mensen.

Kio povas esti ĉiuhoma popolo?

Tio estus popolo el ĉiaj intermiksitaĵoj.

SENAPAGA programo (Vindozo) kun tre vasta esperanta vortaro: **Kompleta Vortaro** kun ĉ. 2.800 ilustraĵoj. Vi trovas la vortojn en la kapvorta parto (17.000) aŭ en la alfabeto-parto (55.000).

Krome oni aldonis pliajn vortarojn: esperanto-angla, nederlanda, franca, italiana, hispana kaj germana.

La vortaro estas senpage kaj povas senprobleme distribuita inter viaj esperanto-amikoj.

Sendu vian nomon al KVortaro@yahoo.com

Mevoj (verso 8)

= Mara birdo kun longaj flugiloj kaj knara° krio.

Aliaj bone konataj birdoj estas ekzemple: la paruo (*mees*), la merlo (*merel*), la kolombo (*duif*), la pigo (*ekster*), la pasero (*mus*).

La hirundo° kaj la cikonio° estas **migrobirdoj**°. Antaŭ la vintro ili kolektiĝas° por ekflugi al varmaj landoj.

Kiel ni povas rekoni cikonion?

Ĝi havas longajn kruojn, longegan kolon°, longan bekon° kaj blankajn plumojn.

En okcidenta Eŭropo oni kredigis al la infanoj, ke la cikonio alportas novnaskitojn.

Zamenhofaĵoj pri birdoj:

Tio estas ankoraŭ birdo sur la tegmento°. *dak*
= neefektivigita° revo. *nog niet gerealiseerd*

Kia la birdo, tia la kaĝo. Signifo?

Laŭ la aspekto aŭ valoro de la kaĝo/domo oni povas taksu la loĝanton/posedanton.

Tio estas ankoraŭ pasero en la aero.

Z. referas al pasero parolante pri io projektita sed ankoraŭ ne efektiva:

Fordoni anseron°, por ricevi paseron. = ? *eend*
fari stultan interŝanĝon

Celante anseron, li trafis aeron. = ?

Mikkend op een eend trof hij lucht.

Kiam direbla?

Li ne sukcesis, li fiaskis.

Kun kia aludo°?

Jen mokema° rimarko, la parolanto parolas malŝate.

Birdoj inspiras al multaj sentencoj. Ekzemple:

Birdon eblas rekoni pro ĝiaj plumoj.

Men kent de vogel aan zijn veren.

Ĉiu birdeto kantas laŭ sia beko.

Ieder vogeltje zingt zoals het gebekt is.

= Ĉiu homo estas unika.

Li estas birdon por la kato.

Hij is een vogel voor de kat.

= Li ne plu povas saniĝi.

Pasero kaptita estas pli bona ol aglo°

kaptota°.

Beter één vogel in de hand dan tien in de lucht.

= Preferindas havi ion malgrandan ol revu pri multo sen sukceso.

Unu hirundo printempon ne alportas.

Eén zwaluw maakt nog geen lente.

Unu bona signo ne sufiĉas.

knarsend

Kaj eble vi rekonas jenan malnovan version:

Ĉiuj birdoj jam konstruis neston,

kial do nur ni prokrastas feston?

Kiel pliriĉigi sian vorttrezoron?

Flue retraduki ĉiujn nederlandajn tradukaĵojn.

TRADUKEKZERCOJ

Solve de la antaŭa.

1) La homo estas la plej inteligenta el ĉiuj bestoj - kaj la plej malsaĝa. (Diogeno).

2) Eĉ la plej simpla homo estas ĉiam ankoraŭ ege komplikita/ kompleksa/malsimpla estaĵo. (Marie von Ebner).

3) La mortema homo similas aktoron (al aktoro), kiu neniam ekscias/sciiĝas, kiel la teatraĵo plue disvolviĝos, en kiu li dum tuta akto kunludis. (Ludwig Fulda).

4) La homo estas nek anĝelo nek besto, kaj la malfeliĉo volas, ke kiu volas ludi kiel anĝelo, prezentas la beston. (Blaise Pascal).

5) Ni tiom ŝatas troviĝi en la libera naturo, ĉar ĉi tiu havas nenian opinion pri ni. (Nietzsche). 6) Se inter la morti-devaj / mortemaj homoj ekzistas io, kio estas ekstermenda kaj kion ĉiu estas devigata per ĉiaj leĝaj rimedoj malhelpi/ kontraŭi kaj helpi preventi, tio estas tutcerte/sen ia dubo la milito. (Erasmus).

Nova

1) Wanneer zegt men van iemand dat hij in de wolken is? Als hij opgetogen is.

2) Meeuwen zijn krachtig gebouwde, langvleugelige zwemvogels.

3) De grijze meeuw of 'kleine meeuw' komt bij rustig weer aan de kust voor, maar trekt bij naderend slecht weer het land in en geldt daarom als voorbode van zwaar weer.

4) 'Alles jubelt'. Alles slaakt vreugdekreten. Jubelend geeft men uiting aan zijn vreugde.

5) Door het leven dartelen is opgewekt en zonder zorgen door het leven gaan.

6) Een lange ziekte of een moeizame verhuizing kan iemand geheel uitputten.

7) De jonge knaap zwerft door de straten.

8) De vlucht der vogels raadplegen: bij de ouden een middel om de toekomst te voorspellen.

Emiel Van Damme

Albert I-straat 44, B. 1703 Schepdaal

RAPORTAĴOJ

1] Aŭtete al la UK en Nitra, Slovakio.

Dutaga veturado tien kaj reen. Triope ni kuraĝe iris survojen. La celo: Tuta semajno en kreita lando kies lingvo nin kunigas.

La unua tago al la akceptejo, informejo, sako kun kongreslibro kaj amaso da faldfolioj. Saluteksplodoj ĉien. La libroservo jam funkcias, ankaŭ la vico antaŭ la bufedo.

Je la 19.00h multaj homoj koncentriĝas ekster la kongresejo por renkontiĝi kaj ĝui la Movadan Foiron sub sunplena ĉielo.

En dimanĉo okazas la Solena Inaŭguro. Aŭtobusoj transportas ĉiujn al iom eksterurba sporthalo kie denove de tempo al tempo homoj entuziasme ekkrias kaj ĉirkaŭbrakumas. Altranguloj elparolas salutvortojn, substrekas la gravecon de komuna lingvo, salutas nome de aliaj gravuloj, klopodas eĉ voĉigi kelkajn frazojn en Esperanto.




anto. Aplaudoj estas je ilia honoro aŭdeblaj. Interesa fragmento estas la prezento de tipa slovakia instrumento kaj kantado.

Ankaŭ tempo por konsulti kaj kolo-

re marki la diversajn programerojn, prelegojn, koncertojn, filmojn, teatraĵojn prezentotajn. Pristudi la mapon de la kongresejo, kompari la slovakajn salonnomojn kun la portempaj honoraj nomoj rabas tempon.

coj sur muroj kaj tabuloj, publikaj spektakloj atentigas la loĝantaron de Nitra pri nia ĉeesto.

Pri la specifaj kunvenoj oni certe povas legi pli en la diversaj revuoj kaj gazetoj. Por mi valoras nun iom skizi la etoson inter pli malpli 1400



La kongresejo troviĝas en ampleksa parko, havas koridorojn kaj vojetojn, la ekstera temperaturo estas tropika, okazas multaj interesaj kunvenoj samtempe, distancoj longaj, do ĉi ĉio povintus lacigi homon, Ĉu? Kaj tiam vin atendas la bongusta slovakia biero. La semajno rapide pasas, ni ĝuas la urbon, en la vesperoj ofte la centro akceptas la esperantistaron sur la centra placo. Oni prezentis la nacian vesperon sur perfekta podio.


Vendrede antaŭ la kongresejo la kongresanoj estas fotataj pere de virabelo. Muzikakompanata iradas publika marŝo al la centra placo, kie denove okazas grandega muzikala festivalo.

Dum la semajno teatraĵoj estis prezentataj en belega urba teatro. Ĉiele verda flago kune kun tiuj de la urbo kaj de Eŭropo flirtas. Grandaj anon-

homoj venintaj el tiel multaj landoj, de ĉie el la mondo, uzantaj kaj ĝuantaj nian komunan lingvon.

Emocie mi ĉeestas la Solenan Fermon, kunkantas la himnon kaj songas pri la estonteco. Mi zorge konservas la kongreslibron kaj la nomŝildon, sciante, ke tiu ĉi estas mia lasta UK.

*Aŭgusto 2016, Jeannette Bosse, Ca-
trien van Heugten, Mareje van Erp.*





Rdlr: Vidu la fotojn frontpagxe Pasintan junion dum Esperanto-aranĝo mi vizitis la rozĝardenon en la Haga Westbroekpark. Mi iris "Per IEI al la rozoj", organizita promenado de la Internacia Esperanto-Instituto far Bert de Wit. La parko estas famkonata pro ĝia vasta kolekto de rozoj diversspecaj, bone prizorgataj. Bedaŭrinde nur malgrandparto de la rozarbustaro jam ekfloris – verŝajne pro la ĉijara malvarma printempo ja abundis burĝonoj sed la normala floradperiodo estis iom prokrastata. Kutime, la unuopaj rozoj abunde montras la kolorspektron ekde la tutblanka tra flava al oranĝa al la plej intense purpurruĝa, ĉiam kun la floroj en unu sama koloro de burĝono ĝis finflorado.

Tamen, kun miro mi eklernis ke ekzistas nova kultivata specio, kiu ŝanĝas koloron dum florado. Interese! Esperplene, ĉiam novaj disvolviĝoj por iri antaŭen. Dum la ĉiĉeronado Bert de Wit rakontis pri diversaj rozospecoj, inter ili la Zamenhof-rozo kaj la Esperanto-rozo.

Laŭ invito de la Interkultura Esperanto-Centro en Herzberg am Harz mi ĉeestis ilian 10-jaran Jubilean Festadon kiel La Esperanto Urbo en julio pasinta. Ie tie mi kunhelpetis en la ordigadoj kaj por la Jubileo kaj

por la SAT-kongreso, kiun mi partoprenontus en posta semajno. Sed pri tio mi nun ne verkas.

Inter la diversaj programeroj de la Jubilea Semajnfino estis akceptoj en la bela, vasta Esperanto-ĝardeno de la Esperanto-domo. Tie floris, inter multaj specoj de fruktarboj kaj -arbustoj, granda kolekto da ornamaj plantoj altaj kaj ĉe-teraj, la Zamenhof-rozo kaj la Esperanto-rozo. Finfine mi povis alrigardi tiujn speciojn, kaj konstati, ke la Zamenhof-rozo estas speco de t.n. grimporozo.

La 10-jara Jubileo komenciĝis per akcepto en la Welfen-kastelo. Inter la ĉeestantoj estis la urbestro de Herzberg, la urbestro de la Pola ĝemela urbo Góra, kaj aliaj reprezentantoj de diversaj Herbergaj kaj Esperanto-organizoj el Germanio



kaj tutmondo.

Post la oficiala akcepto la grupo de invititoj promenis malsupren de la kastelo al la statuo de Zamenhof ĉe la komenco de la butikstrato de Herzberg. Interbabilante ili daŭrigis tra la piedira strato. Fina celo estis la Urbodomo, kie daŭre flagras kaj flirtas Esperanto flago. Do: ne nur pro jubileaj kaj festo-tagaj, sed ĉiam nia konata verda standardo estas hisita, bonkutime, kiel normalaĵo.

En la urbdoma ĝardeneto oni plantis rozarbuston, donacon de la Interkultura Esperanto-Centro Herzberg. Nek Zamenhof-rozon nek Esperanto-rozon (laŭdire pro nehavebleco ĉe rozkultivejoj dum tiu sezono) sed tiun novan rozospecon kun la kolorŝanĝantaj floroj, kiun mi ĵus ekkonis en junio. Nun mi malkovrigian nomon, kiel trovi ĝin en la rozkatalogoj. Montriĝas taŭga nomo: **La Rozo de la Espero!**

Julio 2016, Korine Cheizoo

3] Je sabato la 4a de Junio 2016 okazis **la Kvina Tutmonda ekzamtago de UEA/KER-ekzamenoj**.

Internacia Esperanto-Instituto (IEI) en kunlaboro kun Edukado.net organizis skriban kaj parolan ekzamensesion en sia konstruaĵo (Riouwstraat 172, Den Haag), kune kaj samtempe kun ekzamensioj en diversaj aliaj lokoj en la mondo, i.a. Tokio, Seulo, Londono, Parizo, Bonaero, San Francisko.

La UEA/KER ekzamenoj testas la konon de Esperanto laŭ la kriterioj de la t.n. Komuna Eŭropa Referencakadro (KER) por lingvoj. La sukcesintoj ricevos oficialan atestilon de Budapeŝta universitato.

En Hago partoprenis sep personoj, inter kiuj volontuloj ĉe UEA kaj Esperanto-lernintoj per Duolingo. La parolaj partoj de la ekzameno en Hago parte okazis per Skajpo. Ĉiuj kandidatoj sukcesis!

Fotoj kaj raporto: Edukado.net kaj Piet Buijnsters



SOMERAS 2016 EN GREZILJONO

De sabato la 6a ĝis la 13a de aŭgusto 2016 okazis la studsemajno *Somer*as en la franca kastelo Greziljono, inaŭgurate de Jannick Huet per la malkorkado de la ĉampanboteloj. Post tiu trankvila vespero vere pliiĝis la intenseco de la semajno. Ni matenmanĝis inter 7h30 kaj 8h30, por ke ĉiuj estu pretaj por la lecionoj, komenciĝantaj je la 9a.

La lecionoj ĉiam daŭris ĝis 12h45 kun unu paŭzo je la 11a. Estis tri klasoj je tri niveloj: A, B kaj C. Mi apartenis al la lasta, kiun instruis Mikaelo Bronŝtejn. Przemysław Wierzbowski instruis la komencantojn en la A-klaso kaj Tim Morley la progresantojn en la B-klaso. La lecionoj de Mikaelo estis sufiĉe diversaj: Ili kutime komenciĝis per la sinprezentado de du partoprenantoj, kiujn ĉiuj demandu pri io. Ni ankaŭ laŭvice laŭtleĝis parton de amuza libro, verkita de Mikaelo mem: "Pri Dinjo, Diko kaj aliaj estaĵoj". Cetere li preparis kvizojn pri io ajn, sed ĉefe pri Esperanto kaj literaturo. Oni povis gajni libron kaj bombonojn. La dua parto de ĉiu leciono konsistis el preparado por la muzika kaj internacia vespero: Ni preparis kelkajn kantojn kaj teatraĵon, tradukitan el la rusa de Mikaelo mem.

Studinte intense, ni tagmanĝis je la 13a. Ĉar ni estis en Francio, la tagmanĝo estis multe pli granda ol nia kutima Nederlanda tagmanĝeto. Ni ĉiam havis tri aŭ eĉ kvar manĝmetojn, kompreneble unu el ili estis fromaĝplado.

Dum la posttagmezo ĉiu estis libera fari ion ajn. Feliĉe estis sufiĉe por fari: ĉiutage okazis prelegoj, ekskursoj, joko kaj atelieroj. Ni kutime ankaŭ ludis kelkajn ludojn aŭ sportojn. Ni kreis kampon por ludi la svedan ludon Kubb, dum kiu oni ĵetu lignajn bastonojn por faligi la lignajn blokojn de la alia teamo. Krom tio ni ludis badmintonon kaj kelkajn kartludojn.

La vespermanĝo, kiu estis tiel

granda kiel la tagmanĝo, okazis je la 19a. Post tio estis la vespera programo, kiu ŝanĝiĝis ĉiutage. La tago kutime finiĝis per la diskoteko en la trinkejo en unu el la du kromdomoj.

La unuan posttagmezon, dimanĉon, Jannick gvidis nin tra la arbaro apud la kastelo. Ŝi montris al ni specialajn specojn de plantoj kaj ŝi rakontis pri la ĉirkaŭaĵo.

La sekvontan posttagmezon okazis kelkaj prelegoj. Mikaelo Bronŝtejn rakontis pri la vivo de ege influa rusa Esperantisto Postnikov, pri kiu li verkis libron: "Dek Tagoj de Kapitano Postnikov". Poste Tim Morley instruis nin pri du malfacilaĵoj en la angla: Kial la vorto 'quite' estas evitenda, kaj 'phrasal verbs', kiuj estas kunmetaĵoj en la angla kiuj havas neatendebajn signifojn kaj povas kaŭzi amuzajn miskomprenojn. Tiun vesperon Mikaelo donis koncerton, dum kiu li kantis kaj rakontis pri la sep pekoj.

Mardon kelkaj iris al tre malnova apoteko en Baugé kaj poste vizitis iom de la centro. Tiu vespero estis la ludvespero, dum kiu ĉiuj ludis multajn diversajn tabul- aŭ kartludojn.

Merkredon vespere donis la fama duopo Ĵomart kaj Nataŝa koncerton. Ili ludis kelkajn kantojn de siaj diskoj; Ĵomart per sia akustika gitaro kaj Nataŝa per kelkaj diversaj instrumentetoj. Ambaŭ belege kantis.

Apud Baugé estas pli-ol-4500-jaraĝa dolmeno, kiun ni vizitis Ĵaŭdon. Malgraŭ ĝia malnoveco ni povis en- kaj suriri ĝin. Poste ni promenante iris por ludi la lokan ludon 'Boule de fort'. Dum tio oni ruligu iomete strangan pilkon, por ke ĝi alproksimiĝu al alia normala pilko. La ludo ŝajnas kiel miksaĵo de petanko ('jeu de boules') kaj glitŝtonludo ('curling'). Ĉi tiu vespero estis la muzika vespero, dum

kiu nia grupo prezentis siajn preparitajn kantojn. La kantoj estis tiel, ke ĉiuj facile povis kunkanti. Kelkaj aliaj prezentis ion, inter kiuj Christian Schomers per pianado, Mikaelo Bronŝtejn per kantoj, kaj Ĵomart kaj Nataŝa, kiuj ludis sian tute novan kanton.

Vendredon oni faris la lastajn lecionojn. Poste ĉio estis preparita por nia spektaklo dum tiu vespero: la internacia vespero. Dum tio ni prezentis la teatraĵon 'Provizo'. Rakontiĝis, ke damo deponas provizon en trajnon: divanon, pianon, valizon, tornistran, kanistran, ĉapelon kaj vilan hundeton belan. Ĉiu persono estis unu el la aĵoj kaj ankaŭ rakontis parton de la rakonto. La aĵoj estis menciataj laŭvice dum ĉiu parto, krom la ĉiam-ŝanĝiĝanta parto de la hundeto, kiu eskapis el la vagono! Ĝi estis amuza skeĉo.

Sabaton matene mi adiaŭis ĉiujn, forlasante la kastelon. Kelkaj homoj ankoraŭ restis por la ekskurso, kiu okazis dimanĉon. Bedaŭrinde mi ne povis ĉeesti tion.

La restado estas tre agrabla kaj trankvila. Oni povis tendumi en la apuda kampo aŭ lui ĉambron en la kastelo mem. Mi restis unuope en dulita ĉambro. Tio estis iom kosta, sed pro tio, ke oni povis helpi en la farenadoj kontraŭ po €10 da rabato hore, ĝi estis facile pagebla por malriĉa studento kiel mi.

Someras ja estas rekomendinda kaj por mi ripetinda!

Joost Franssen



Mi ricevis de amiko HORI Jasuo la jenon:

Mia amikino s-ino Jamakaŭa Se-cuko tradukis la kanton "Hejme floras certe ..." kaj aperigis la kanton en la suba YouTube. Lastan jaron mi raportis pri tiu kanto, do por via pli bona kompreno, mi alkroĉos la raporton. Bonvolu aŭskulti la kanton kaj pensu pri la vivo de suferantoj en Fukuŝima.

HORI Jasuo

"Hejme floras certe sed ..." estas Esperanta versio de la originale japana kanto "Hanaŭa Sakedomo" pri homoj dispelitaj de siaj hejmoj pro la akcidento en la nuklea centralo N-ro 1 de Fukuŝima post la granda tertremo en Nordorienta Japanio en la 11-a de marto 2011.

La kanton poemverkis, komponis kaj kantas la muzikgrupo Kageboushi (Esperante: Silueto), kiu konsistas el 4 viroj loĝantaj en Jamagata -- gubernio najbara al Fukuŝima sed ne trafita de la akcidento. La kanto temas pri la koro de homoj, kiuj pro registara ordono ne povas reveni al sia hejmloko post la akcidento. Ĝi kortuŝis multajn homojn.

Por diskonigi la kanton, la grupo lanĉis la projekton inviti multajn aliajn muzikistojn en Japanio kanti ĝin. Iu proponis kaj faris la anglan version. Mi partoprenis en la projekto per Esperanta versio. Mi kunordigis miajn geamikojn, kiuj aŭ esperantigis la poemon aŭ kantis la kanton kun muzikiloj.

Bonvolu aŭskulti la kanton en la jenaj Youtube-filmetoj. Bonvolu

vidi kiel trafitaj lokoj aspektas hodiaŭ.

https://youtu.be/GxzeC2_ars0 (kantado en Esperanto)

<https://youtu.be/xqNN4Juc8Ag> (karaoke-versio sen kantado)

*Por vidi la Esperantajn subtekstojn alklaku la plej maldekstran ikonon ĉe la fundo de la ekrano kaj la apudan florforman ikonon.

<https://youtu.be/5Vd8owCwSTM> (originala versio en la japana)

Bonvolu disvastigi ĉi tiun kanton al homoj ĉirkaŭ vi. Vi ankaŭ rajtas traduki kaj kanti ĝin en via propra lingvo. Ni ne forgesu la katastrofon de la nuklea centralo de Fukuŝima.

Projekto: Esperanta versio de "Hanaŭa Sakedomo"

--"Hejme floras certe sed ..."

YAMAKAWA Setsuko
setsuko@gol.com



BeNeLuxsa Kongreso 2016

16 septembro om 14:00 -Lier (België)

FEL Esperanto-Congres in Samenwerking met België (Vlaanderen, Wallonië, Brussel), Nederland en Luxemburg.

Wanneer? 16 - 19 septembro 2016

Waar? Cultuur-hotel "Bed-Muzet", Volmolenstraat 65, 2500 Lieer.

Voor wie? Ons congres is voor iedereen: volwassenen, jongeren, kinderen, beginnelingen en gevorderden, vloeiende praters en stille genieters, BeNeLux-bewoners of buiten-BeNeLux-bewoners.

Wat? Dit! Reeds lang is het BeNeLux-Congres **dé Esperanto-bijeenkomst in de BeNeLux: Internationaal dankzij de deelnemers die niet enkel uit Vlaanderen, Wallonië, Brussel, Nederland of Luxemburg komen, maar ook van ver buiten die grenzen. Dit congres wordt professioneel georganiseerd en is toegankelijk voor iedereen. Bovendien zorgen we steeds voor betaalbaar én comfortabel onderkomen én smakelijke maaltijden. Net als voor de vorige BeNeLux-congressen bereiden we een gevarieerd en aantrekkelijk programma met: Esperanto-cursussen voor elk niveau met mogelijkheid tot examens, vakkundige voordrachten, diverse soorten verrassende concerten, ateliers zowel voor volwassenen als voor kinderen, wandelingen en dagelijks een keuze aan diverse excursies, onder andere dagelijks een andere fietsuitstap. En uiteraard dé boekendienst van FEL (als U de boeken tijdig bestelt zullen ze voor U klaar liggen). Enz Enz.**

Het is gewoon **dé extra gelegenheid voor beginnelingen, gevorderden en experts om dit jaar in 4 intense dagen Esperanto toe te passen en te verspreiden.**

Voor al Uw vragen en suggesties: Nicky Janssen nicky24@telenet.be - 0488 35 22 02

Ga naar de speciale website van het BeNeLuxsa-Kongreso. <http://bnlk2016.weebly.com/>

vendredo	<i>posttagmeze</i> <i>vespere</i>	Urba ĉiĉeronado Koncerto de regej-kantisto Jonny M + ripetado surprizkoncerto
sabato	<i>matene</i>	Seminario 'Nuntempa varbado por Esperanto': sesio kun Valere Doumont, vigla skoltestro Seminario 'Nuntempa varbado por Esperanto': sesio kun Veronika Poor, UEA-direktoro Prelego Blisa Skribo (Lode Vandeveldel) Kursoj (komencantoj & progresantoj) Surprizkoncerto en la urbo + kariljonado (de Jo Haazen) Konversacia kurso Biciklado / manlaboro Klasika koncerto
	<i>posttagmeze</i>	Prelego 'La verdaj skoltoj' (Valère Doumont)
dimanĉo	<i>vespere</i> <i>matene</i>	'Nuntempa varbado por Esperanto': sesio kun Flory Witdoeck, vigla aganto diversterene 'La nuna stato de nia literaturo' (Christian De Clerck) Kursoj (komencantoj & progres.)
	<i>seminario</i>	Ekskurso al Antverpeno / Bicikla ekskurso al diamantcentro / manlaboro
	<i>oprelego</i>	Konversacia kurso
	<i>posttagmeze</i>	Kvizoludo
lundo	<i>vespere</i> <i>matene</i>	Prelego "la mirindaj satelitoj de Saturno" (Bernard-Régis Larue)
	<i>posttagmeze</i>	Prelego 'Laŭ la plej bela fluo de Ĉinio' (Marc Cuffez) Bicikla ekskurso al la fortikaĵoj ĉirkaŭ Lieer / manlaboro



Kiel plej efike lerni lingvojn?

En sia ripeta prezentado en la *UK de Nitra* (pro la manko de lokoj en salono dum la unua prezentado) Lýdia Machová (Slovakio) prezentis sian metodon lerni lingvojn, per kiuj ŝi jam lernis dekon de lingvoj. Ŝi prezentis kvar principojn por lingvolernado. **Unue**, necesas amuziĝi por lerni la lingvon. Necesas fari amuzajn aferojn, ekzemple aŭskulti podkastojn aŭ legi pri temoj, kiuj interesas la lernanton. **Due**, necesas multe da kvanto por lerni, do multe da tempo. La lernanto devas multege praktiki la lingvon, aŭskulti la lingvon kaj se li aŭ ŝi volas lerni paroli, necesas praktiki paroladon. Bezonatas multaj horoj ĉiusemajne. **Trie**, la ofteco de lernado gravas. Pli bone estas lerni iomete ĉiutage ol dum pluraj horoj unufoje semajne. Eblas lerni lingvon, ekzemple dum kurado aŭ kuirado aŭskultante surbendigadojn el sia telefono per la lernata lingvo. **Kvare**, necesas lerni sisteme, do uzi multe da tempo kaj ne seniluziigi, kiam aperos malfacilaĵoj. Por transpasi la limon al flua parolo necesas lerni plu post la komencanta nivelo.

Utilaj por lernado estas laŭ Lýdia podkasto, do radioprogramoj, kiuj aŭskulteblas el interreto en preferata tempo kaj ne nur tiam, kiam la elsendo okazas. Eblas instali al sia telefono aplikaĵon, per kiu eblas trovi podkastojn en diversaj lingvoj. Ankaŭ dulingvaj libroj estas bona rimedo por lerni. Se teksto aperas paralele per lernata lingvo kaj per lingvo, kiun la lernanto jam bone konas, eblas legi rekte la tekston en lernata lingvo kaj kontroli el alilingva versio, se iu frazo aŭ vorto restas nekonata. Se ne troviĝas dulingvaj libroj kun paralelaj tekstoj, eblas uzi du librojn

en diversaj lingvoj. Se lernanto legas 2-3 paĝojn tage, post kelkaj monatoj li legas libron jam per nova lingvo.

Vortprovizo en la nova lingvo estas tre grava, kaj tion eblas kreskigi per vortlistoj laŭ metodo de Goldlist (ora listo). Laŭ tiu metodo la lernanto skribas 20 vortojn en kajero kaj laŭtlege ilin, kaj ripetas tiujn vortojn nur post 14 tagoj; tiam la lernanto jam lernis eble 30% el la vortoj, kaj tiel restas por plua lernado nur tiaj vortoj, kiuj estis malfacilaj. La du-semajna periodo estas grava, ĉar tiel la vortoj restos en longedaŭra memoro. Tamen eblas en sekva tago lerni aliajn 20 vortojn kaj tiel rapide kreskigi la vortprovizon.

Se ne troviĝas parolanto de la lingvo, kun kiu eblas disku-

ti en propra loĝloko, eblas trovi kunparolanton per interreta servo italki.com kaj paroli rete per skajpo.

Por ne miksi lingvojn unu al alia, Lýdia rekomendas lerni novan lingvon per alia lingvo, ekzemple ŝi mem lernas la rusan per la pola. Ŝi ankaŭ diris, ke se ŝi komencus lerni lingvojn denove ekde la komenco, ŝi lernus Esperanton kiel la unuan fremdan lingvon. Gramatiko, laŭ ŝi estas esenca, sed necesas nur lerni tiom da gramatiko, kio estas bezonata por tiu celo, por kiu la lernanto lernas la lingvon. Oni ne devas lerni la gramatikon per gramatikaj klarigoj, sed eble nur per multaj ekzercoj. Kaj ne necesas timi erarojn, ĉar ili helpas lerni la vortojn, post unu grava eraro la ĝusta vorto restas firme en la memoro.

Ŝia konsilo al lingvolernemuloj estas "Ne forgesu lerni lingvojn amuze, ofte, sisteme kaj multe!"

Ligoj por menciitaj lingvolernaj helpiloj:

www.huliganov.tv/goldlist: klarigo de la metodo Ora listo (transskribo de vortlistoj en kajero)

www.italki.com: retpaĝo por trovi lingvopartnerojn

Podcast & Radio Addict: aplikaĵo por aŭskulti podkastojn (registraĵojn) en multaj lingvoj

Oni povas trovi pli da informoj pri Lýdia Machová ĉe www.language mentoring.com.

Jukka Pietiläinen

info@esperanto-info.nl

Port betaald
Port payé
Pays-Bas

PostNL

21a Jarkolekto, n-ro 5
septembro-oktobro 2016
Eventueel retouradres:
Esperanto Nederland
Gerrit Berveiling
Van Vredendrechtweg 435
2284 TA Rijswijk

FENIKSO